ĈESPA



ĈILIO
CASILLA 13828
SANTIAGO 21

N-RO: 2

SEPT - '78 -

LA VERDA SAGO

PREZO: 15ᶜ

LA VERDA SAGO PORTAS LA VERDAN STELON ĈE LA LANDO DE

ESPERANTO, EL IDIOMA INTERNACIONAL. /Conclusion/.

/Danielo Zanelli C./.

Asimismo, empresas turisticas, comerciales e industriales-principalmente europeas-lo emplean en folletos de propaganda. Decenas de emisoras de radio tienen programas al extranjero en la lengua mundial. Hay cátedras de la misma en unas treinta Universidades repartidas en los cinco continentes. Aproximadamente el mismo número de Editoriales Esperantistas han publicado unos cincuenta mil titulos en obras literarias, cientificas, técnicas y de otras indoles, originales en Esperanto o traducidas a él, incluyendo cerca de doscientos diccionarios generales o especializados.

Ya hay más de cien calles o plazas llamadas Esperànto o Zamenhof/algunas incluyendo estatuas/ en numerosos paises del mundo.

La Academia de la Lengua estudia permanentemente la adopción de nuevos términos y regula el desarrollo del idioma mundial.

Anualmente, la Universala Esperanto Asocio realiza su Congreso Mundial. Este año, 1978, se ha efectuado el Primer Congreso Latinoamericano.

La sede mundial del Movimiento Esperantista está en Rotterdam, Holanda, y el Directorio está compuesto actualmente por: Presidente, Dr. Humphrey Tonkin/de USA/; Vicepresidentes: Prof. William Auld/de Escocia/ y Prof. Dr. Carl Støp-Bowitz/de Noruega/; Secret. General es el Dr. Werner Bormann/de Alemania Occ./; Directores: sra. Ursula Grattapaglia/de Brasil/, sr. Gregoire Maertens/de Bélgica/, Prof. Andrzej Pettyn/de Polonia/ y la Dra. Flora Szabó-Felsö/de Hungria/. De diversas profesiones y, como se ve, de distintos paises e ideologias, pero unidos en la aspiración comun de paz y cooperación amistosa.

Desgraciadamente, cada guerra mundial ha impedido los Congresos y ha causado un retraso de muchos años en la difusión del idioma, cuyo caracter es absolutamente ajeno a intereses e ideologias.

§&%

Algunas libros conocidos traducidos al Esperanto.

"Los 3 pelos del Diable"/Hermanos Grimm/.
"El árbol de la Ciencia"/Pio Baroja.
"Doña Bárbara"/Rómulo Gallegos/.
"Don Quijote de la Mancha"/Cervantes/.
"El Lazarillo de Tormes"/Anónimo español/.
La Santa Biblia, El Corán, etc., etc., ...

§§§§§§§§§§§§§§&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&%%%%%%%%%%%%

LA DIRECCION DE LA ASOCIACION CHILENA DE ESPERANTO /ĈESPA/ ES:
CASILLA 13828, SANTIAGO 21, C H I L E

ESPERANTAJ FAKOJ PRI ĈIO.

Korosponda Servo Mondskala/KSM/:Estas faka organizaĵo kiu regulas kaj faciligas la korespondado inter la geesperantistoj tra la tutmondo.Tial KSM celas havigi al siaj membroj korespondantojn laŭeblo konformajn al iliaj dezirој .Ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi,sed ne ricevos rektan respondon,ĉar la Korosponda Servo disponas pri nenia financa subvencio.Adreso de KSM estas:f-ino C.Hueter,12 rue des Jacobins,F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo.

754754754754754754754754754754754754754754754754754754754754754754754754
%&§

Muzika Esperanto-Ligo/MEL/:Celas kunligi muzikistojn/profesiajn kaj amatorajn/kaj muzikamantojn pere de la internacia lingvo Esperanto.La Kotizo estas 3 usonaj dolaroj.La organo de MEL/"Muziko"/estas periode sendata al la membroj.Adreso de la kasisto estas: S-ro,D.Lamb,First Floor Flat,Weech House,8 Empsons Hill,Dawlish, Devon Britujo.

§&%
%&§

SERĈAS GEKORESPONDANTOJN!

F-ino.Nobuko Matsumura.
shirogiku-so 22-13,
Komaba I-chome
Meguro,Tokyo,153,
Japanujo.

Jacques Lindau/21-jara/
3,rue Pershing,
F-57100 Thionville,
Francujo

'"/%&!§_:ţ'"/%&!§_:ţ'"/%&!§_:ţ'"/%&!§_:ţ'"/%&!§_:ţ'"/%&!§_:ţ'"/%&!

HUMURO.

Sinjoro Pérez,kiu dum longa tempo oferis sian tutan libertempon por konstruo de vilao,iu mateno telefonis al sia laborejo por deklari sin nekapabla labori.

-Hieraŭ ni festenis la tegmentadon de mia vilao kaj hodiaŭ mi devas resti en la lito.

-Ĉu tro multe da brando?

-Certe jes.Mi iris sur la balkonon por ricevi iom da freŝa aero.

-Jes...?

-Ĝi ankoraŭ ne estas konstruita...

%&§

ĈU VI SCIAS .....?

Ke ekzistas UEA delegitoj en Arubo,Argentino,Acoroj /Port./,Aŭstralio,Aŭstrujo,Belgujo,Brazilo,Britujo,Bulgarujo,Ĉeĥoslovakio,Ĉilio,Ĉinujo/Popola kaj Nacia/,Danlando,Finnlando,Francujo, Germanio,Grekujo,Gvatemalo,Hindujo,Hispanujo,Hongkongo,Hungarujo, Indonezio,Irako,Irano,Irlando,Islando,Israelo,Italujo,Japanujo, Jugoslavio,kaj en multaj aliaj landoj ĉie

IO PRI LA PACO.

/Jorge Tachauer S./.

G.Murphy je la jaro 1945 publikigis manifeston pri la homa naturo kaj la paco,produktaĵo de aro da psiĥologoj kiuj dediĉis pri ĉi tiuuverko tuj poste la Dua Mondmilito.Tiu etudo havis kiel bazo la sekvontaj principoj:

1-La milito povas esti evitata.Ĝi ne estas inherenta a la homa kondiĉo;la homoj ne naskiĝas militemaj,ili fariĝas militemaj.

2-La unua faktoro je interezo en la planado de la paco estos la novaj generacioj.

3-La malamoj kiuj disigas la popolojn/t.e.politikajn ŝtatojn/ povas esti kontrolataj ĝis tre alta grado.

4-La sinteno de supreco el la ne tiel alte evoluĝitaj popoloj, estas fatala por la kaŭzo de la restanta paco.

5-La plej bonaj projektoj por konstrui daŭrigotan pacon ni povas trovi en la fundamentaj deziroj de la komuna homo ĉie en la mondo.

Pri la unua punkto,ni scias ke la infano estas ĉirkaŭita de multaj stimuloj,kaj kelkaj inter ili lin gvidas por fari malpacifikajn agojn.Ekz.,la patrino laboras eksterhejme kaj servantino zorgas pri la infano.Li povas esti zorgata bone,sed tio ne estas la sama ol se sia patrino zorgus pri li.Pro tio,la infano protestas/Konscie aŭ inkonscie/per fortega agado:li rompas ludilojn,vitrojn,ktp,aŭ li kverelas kun siaj malgrandaj fratoj. Laŭgrado kiel li kreskas,li havas pli multajn eksterajn malpacifikajn stimulojn:TVon,kinon,novaĵojn en la ĵurnaloj,ktp.

La dua punkto estas preskaŭ memvidebla.Estus necesa tre granda agado pri la novaj generacioj por eviti ilian kreskadon kaj evoluigon interne de la malvirta rondo kun ĝiaj negativaj efikoj.

Pri la tria punkto estus necesa plialtigi la kulturan nivelon de la popoloj.Se ili/la popoloj/estus pli kleraj kaj pli bone informitaj ol ili estas hodiaŭ,la malamoj estus pli malgrandaj kaj la militoj povus esti evitataj.

La kvara punkto havas la saman solvon ol la trian: edukado,klerado kaj informado.

Pri la kvina punkto mi pensas ke la fundamentaj deziroj de la homoj ĉie en la mondo estas tre simplaj kaj tre konataj:nutradoj,domoj,vestaĵoj kaj kulturo.Tio estas tre simpla teorie sed tre malfacila akiri praktike.

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%&&&&&&&&&&&&&&&&&&§§§§§§§§§§§§§

LA VERDA SAGO estas oficiala bulteno de ĈESPA.La Komitato de Redakcio estas la Estraro.

ALIĜU ĈE Ĉ E S P A.
Casilla 13828,Stgo.21,Ĉilio.

Prezo:15^{00} aŭ 2 irk.
Abono por 12 numeroj: 20 irk.
Ni akceptas interŝanĝon kun aliaj esperantistaj revuoj!
Direktoro:Jorge Tachauer S.

Malgranda Romano. Aŭtoro: Julio Baghy.

-Mi ne komprenas vin, fraŭlino, kaj vi ne komprenas, kio estas sekreto? Ĉu ĝi estas sekreto?!

-Ne! La sekreto ne estas sekreto, sed dolĉa ĉokolado.

Sed ŝi scias: la dolĉa sekreto estas en ŝi kaj ne en la skatolo.

-Mi gratulas!

-Mi dankas!

Nik Nek tenas la ĉokoladon kaj rigardas ŝin. Li rigardas kaj komprenas: fraŭlino Kat Jen estas bela ruĝa rozo kaj dolĉa ĉokolado. Ŝi estas dolĉa, dolĉa, dolĉa!!

-Ĉu vi amas la ĉokoladon?

-Jes!

Kaj ŝi rigardas malkuraĝe-ne la ĉokoladon. Ĝi estas malinteresa bruna objekto. En la ĉambro estas nur unu interesa kaj grava: la sinjoro instruisto Nik Nek.

II

La homoj dormas en la nokto, sed fraŭlino Kat Jen ne dormas. Ŝi kuŝas en la lito, fermas la belajn bluajn fenestrojn de la kapo kaj faras fantaziajn bildojn. Interesaj bildoj estas ili. Du homoj-li kaj ŝi-faras longan konversacion en la silenta ĉambro. Ili parolas novan lingvon, modernan mondlingvon. La vortoj kaj frazoj estas bela muziko. Ŝi komprenas ilin kaj ŝi estas feliĉa. En la lernejo la JUNA INSTRUISTO demandas kaj ŝi respondas, sed en la fantaziaj bildoj ŝi demandas kaj li respondas. Interesa konversacio. Ŝi faras ĝin en la koro. Jes, jes! Kat Jen estas moderna knabino, sed la knabina koro ne ŝatas la modernan muzikon. Ĝi ŝatas la malnovan dolĉan muzikon: la amajn fantaziajn bildojn. La koro parolas, la bela juna kapo faras romanon.

-Mi salutas vin, sinjoro!

-Bonan tagon, fraŭlino Kat Jen!

La frazoj montras: ŝi estas inteligenta bona knabino. Ŝi scias la etiketon. En la fantazio la nokto estas tago. Ŝi prenas seĝon kaj montras ĝin.

-Sinjoro, vi estas hejme. La seĝon mi metas al la tablo. Ĉu vi deziras teon?

-Mi dankas, fraŭlino. Mi ŝatas varman nigran kafon kun lakto.

-Jes, sinjoro! Ĉu vi deziras cigaron?

-Ne, fraŭlino! Mi ŝatas malfortajn cigaredojn.

-Ho, mi estas malfeliĉa! Mi ne havas cigaredon, mi ne havas cigarojn. Mi havas bonan dolĉan ĉokoladon. Dolĉan sekreton en bela skatolo. Ĉu vi havas apetiton? Sinjoro, mi parolas, parolas sed vi ne aŭskultas min. Vi estas malbona homo. /Sekvos/

/Malgranda helpo por la gelernantoj/.

A

Abelo-abeja
aĉeti-comprar
adiaŭ-adiós
afero-asunto
agi-actuar
agrabla-agradable
aĝo-edad
akvo-agua
al-a,hacia
alia-otro
almenaŭ-al menos
alta-alto
alumeto-fósforo
alveni-llegar
ami-amar
ambaŭ-ambos
amiko-amigo
amplekso-tamaño
amuzi-divertir
ankoraŭ-todavia
anonci-anunciar
anstataŭ-en vez de
antaŭ-ante,antes de
aparteni-pertenecer
apenaŭ-apenas
aperi-aparecer
apoteko-farmacia
apud-junto a
aranĝi-arreglar
arbo-árbol
arĝento-plata
arto-arte
atendi-aguardar
atenti-atender
atingi-alcanzar,lograr
aŭ-o
aŭdi-oir
aŭgusto-agosto
aŭskulti-escuchar
aŭtuno-otoño
avo-abuelo
azeno-asno

B

Babili-charlar
baki-hornear
bakalaŭro-bachiller
balo-baile
balai-barrer
baldaŭ-pronto
baleno-ballena
baleto-ballet
balono-pelota
baloti-votar
bani-bañar
bandaĝi-vendar
banko-banco/com./
banto-lazo
barbo-barba
barelo-barril
bati-golpear
bazo-base
bedaŭri-lamentar
bela-bello
bendo-cinta,forro
benko-banco/asiento/
bereto-boina
besto-animal
betono-hormigón
bezoni-necesitar
biblioteko-biblioteca
biciklo-bicicleta
biero-cerveza
bilardo-billar
bildo-cuadro,figura
bileto-boleto
birdo-pájaro
biskvito-bizcocho
blanka-blanco
blato-cucaracha
blinda-ciego
blonda-rubio
blovi-soplar
blua-azul
bluzo-blusa
boato-bote
bopatro-suegro
boji-ladrar
boli-hervir
bona-bueno
bonvoli-tener a bien
botelo-botella
brako-brazo
branĉo-rama
breto-anaquel
briko-ladrillo
brili-brillar
broĉo-broche
brodi-bordar
bronko-bronquio
bronzo-bronce
broŝuro-folleto
brovo-ceja
bruo-ruido
bruli-arder
bruna-moreno
brusto-pecho
bufro-tope
bulteno-boletin
buŝo-boca
butero-mantequilla
butiko-almacén/com./
butono-botón.

/Sekvos en la venonta numero./.

%&§%

La limitdato por ricevi artikolojn estas la 25an de ĉiu monato!

754575457545754575457545754575457545754575457545754575457545754575457